FESTOTAGO DE LA KORPO KAJ SANGO DE JESUO – 6an de junio 2010

ĈIUJ SATIĜIS – Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Lk. 9, 11-17

En tiu tempo Jesuo ekparolis al la homamaso pri la regno de Dio, kaj tiujn, kiuj bezonis kuracon, resanigis.

Kaj ekvesperiĝis; kaj la dek du, alproksimiĝinte diris al li: "Forsendu la homamason, por ke ili iru en la ĉirkaŭajn vilaĝojn kaj kampojn, por trovi ripozejojn kaj nutraĵon; ĉar ĉi tie ni estas en dezerta loko".

Sed li diris al ili: "Vi donu al ili manĝi". Kaj ili diris: "Ni havas ne pli ol kvin panojn kaj du fiŝojn, krom se ni ne irus kaj aĉetus manĝaĵon por ĉi tiu tuta homomulto". Ĉar ĉeestis proksimume kvin mil viroj.

Kaj li diris al siaj disĉiploj: "Kuŝigu ilin en aroj, po proksimume kvindek". Kaj tion ili faris, kaj kuŝigis ĉiujn.

Kaj li prenis la kvin panojn kaj la du fiŝojn, kaj suprenrigardinte al la ĉielo, li ilin benis kaj dispecigis, kaj donis al la disĉiploj, por meti antaŭ la homamason.

Kaj ili manĝis, kaj ĉiuj satiĝis; kaj oni kolektis da postrestintaj fragmentoj: dek du korbojn.

Jesuo kune kun siaj disĉiploj foriras aparte al urbo, nomata Betsaida, ekster la juda teritorio ĉar li volas instrui siajn disĉiplojn pri io kion li alprenis. Pro tio li ilin malproksimigas de la ĝisfunde naciisma kaj fanatika medio.

La evangeliisto skribas: "Sed la homamaso, eksciinte tion, sekvis lin". Por la homamaso Sankta Luko uzas la verbon 'sekvi' kiu indikas la tutan sekvantaron de Jesuo. "Li akceptis ilin, kaj parolis al ili pri la regno de Dio". Li ne priparolas la regnon de Izraelo kiu jam mortis, sed Li priparolas la regnon de Dio, nome pri la universala regno de la amo de Dio, kiu celas nek apartan popolon nek apartan religion, sed estas malfermita al la tuta homaro.

La sekvo de la anonco de la regno de Dio estas ankaŭ la vivo kiun ĝi komunikas, jen kial Sankta Luko daŭrigas: "tiujn, kiuj bezonis kuracon, li resanigis". Poste la evangeliisto aldonas gravan indikon ĉar li komprenigas al ni ke ĉi tie li ne volas rakonti simplan okazintaĵon, sed ke li volas doni al ni profundan teologian indikon.

"Kaj ekvesperiĝis" ni trovas tiun ĉi saman dirmanieron ĉe la 24a ĉapitro, versego 29a en la evangelipeco pri la Emausa vespermanĝo kie Jesuo rekonigas sin en la Eŭkaristio. Do, la evangeliisto volas diri al ni: "atentu, la tutan evangelipecon oni devas legi laŭ eŭkaristia vidpunkto".

“Kaj la dek du...”, per la cifero dek du oni aludas la disĉiplojn kiuj venas el Izraelo; ili estas dek du kiel la dek du triboj, “alproksimiĝis al li”. La evangeliisto faras distingon inter la homamaso kiu sekvas Jesuon kaj la disĉiploj. La disĉiploj tute ne sekvas lin. Ili alproksimiĝas al Li. La disĉiploj akompanas Jesuon, sed Lin ne sekvas ĉar ilia modela Mesio de la regno estas tute malsama ol tiu kiun Jesuo anoncis.

Kaj ili intervenas dirante “Forsendu la homamason”. La homamaso ne laciĝis, estas la disciploj kiuj estas lacaj kaj ili volas kvazaŭ sin malembarasi de ĝi. Kaj la preteksto estas: “por ke ili iru en la ĉirkaŭajn vilaĝojn kaj kampojn, por trovi ripozejojn kaj nutraĵon”. Ĉi tie ni estas en dezerta loko, do tiu estas preteksto por liberiĝi de tiu ĉi tuta homamaso kiu vere sekvas Jesuon.

Sed jen Jesuo kiu, laŭlitere diras al ili: “Vi donu al ili manĝi”. Ĉi tie Jesuo ne estas donanta la indikon: “prizorgu vi la manĝaĵon, sed ĉar la signifo estas tiu eŭkaristia, ĝi estas multe pli profunda kaj riĉa. Laŭlitere la evangeliisto skribas: “vi donu vin mem por manĝi”, jen la signifo de la Eŭkaristio.

Ĝi ne konsistas nur en la ofero de io, sed temas pri ofero de si mem al la alia, estas tio kio komunikas la vivon. Sed ili rebatas, “Ni havas ne pli ol kvin panojn kaj du fiŝojn”. En tiu ĉi evangelipeco ni vidas multajn nombrojn. La nombroj en la Biblio kaj en la Nova Testamento neniam devas esti komprenataj laŭ ilia matematika signifo sed ĉiam laŭ ilia figura signifo. Kaj poste ni vidos la nombron kvin kiu altiĝas: kvin, poste kvindek, poste eĉ kvinmil.

Ĉiukaze kvin plus du faras sep kaj sep signifas ĉion kion ili havas.

“Krom se”, grumblas la disĉiploj, “ni ne irus kaj aĉetus manĝaĵon”. Jen la malakordo inter Jesuo kaj liaj disĉiploj: Jesuo priparolas doni, nome kundividi, kaj ili, male, rezonas pri aĉetado.
Nome, kiu havas monon tiu aĉetas, manĝas kaj vivas; kiu ne havas monon faras nenion el ĉio tio. **“**Por ĉi tiu tuta homomulto”, ĉi tie ne estas “homamaso”. La evangeliisto uzas la terminon ‘popolamaso’ kaj la dek du ĝin uzas preskaŭ laŭ malestima maniero.

“Ĉar ĉeestis proksimume kvin mil viroj”. Tiun ĉi saman dirmanieron: “preskaŭ kvin mil viroj”, ni trovas ĉe la 4a ĉapitro en “La agoj de la apostoloj”, kie oni indikas per ĝi la nombron de la origina komunumo. Ne temas pri popolnombrado: kvin, kvindek, kvincent, kvinmil, ili estas ĉiuj multobloj de la agado kiu indikas la Sanktan Spiriton.

Pentekosto, kvindeka tago, tiu estas la nombro kiu indikas la agadon de la Sankta Spirito. Do en la Nova Testamento la nombro kvindek kaj ĝiaj multobloj indikas la agadon de la Sankta Spirito. Kvinmil indikas agadon puŝitan ĝis la maksimumo, kvin multobligitan per mil.

“Li diris al siaj disĉiploj: “Kuŝigu ilin”, kial Jesuo okupiĝas pri tiu detalo? Ĉu ili ne povas manĝi kiel ili deziras? Starante, sidante... Ne, Jesuo diras “kuŝigu ilin”, kaj tiu ĉi estas tipa verbo ĉe Sankta Luko, kaj ĝi estas la sama kiun ni trovas en la evangelipeco pri Emauso. Dum la festaj tagmanĝoj la sinjoroj manĝis kuŝantaj, sternitaj sur litetoj. Kiu povis tion fari? Kiu havis servistojn kiuj lin servis.

Tiam Jesuo diras ke la tasko de sia komunumo, de la disĉiploj estas tiu: kuŝigi, nome sentigi liajn sekvantojn kvazaŭ sinjoroj. “En aroj, po proksimume kvindek”, kaj jen revenas la nombro kvindek, kiu indikas la agadon de la Spirito. La profetoj en la Malnova Testamento estis kunigitaj en aroj po kvindek. “Kaj tion ili faris”.

Kaj ĉi tie la evangeliisto antaŭanoncas la agoj kiujn Jesuo faros sur la pano kaj sur la vino kiam li la unuan fojon donis al la siaj la Eŭkaristion. “Li prenis la kvin panojn, kaj suprenrigardinte al la

ĉielo", kiel signo de plena kunesto kun la patro, "li ilin benis kaj dispecigis", jen la samaj vortoj de la Eŭkaristio, do, en tiu evangelipeco la evangeliisto bildigas la profundan signifon de la Eŭkaristio.

Ne povas ekzisti la Eŭkaristio sen dispartigo je kio oni estas kaj je tio, kion oni havas. "Kaj li donis ilin al la disĉiploj, por meti antaŭ la homamason". La disĉiploj ne estas la posedantoj de tiu ĉi pano, sed ili estas iliaj servistoj. Ili ne estas la proprietuloj de la panoj sed ili devas disdoni ilin al la homamaso, sen demandi kiu tion meritas kaj kiu ne tion meritas. Ni vidas ke ĉi tie Jesuo ne petas la homamason sin purigi; antaŭ ol manĝi oni devis fari la ritan lavadon de la manoj.

Nenio el ĉio tio. Oni ne devas sin purigi por akcepti la panon kiu estas la Sinjoro, sed la akcepto de la pano, de la vivo kiun la Sinjoro donas, estas ĝuste tio kiu onin purigas.

"Kaj ili manĝis, kaj ĉiuj satiĝis**";** ĉi tie la evangeliisto vidas la realigon de la profetaĵo de Dio farita en la Malnova Testamento al la profeto Elizeo: "tiele diras la Eternulo: Oni manĝos, kaj ankoraŭ iom restos".

"Ili manĝis, kaj ĉiuj satiĝis; kaj oni kolektis da postrestintaj fragmentoj: dek du korbojn". Dek du kiel la nombro de la triboj de Izraelo. La dispartigo de la pano, la kundivido de tio kion oni havas kaj de tio kio oni estas sukcesas malsatigi la tutan popolon de Izraelo.